655.23 : 408.92

## PRI TIPOGRAFIO, EN RILATO KUN SUPERSIGNO-HAVAJ ESPERANTO-LITEROJ

**(A. Lienhardt, Mulhouse, Francio)**

Estas konate, ke literoj kun supersignoj ekzistas ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en diversaj aliaj lingvoj, ekzemple en la slavaj, en la franca, kaj en aliaj.

Same estas konate, ke la supersigno-havaj literoj en Esperanto jam ofte estis celpunkto por kritikemuloj. Iuj kritikas, ja prave, ĉar multaj presejoj malhavas la koncernajn liter-tipojn, aŭ ne havas ilin en ĉiuj necesaj liter-kategorioj, kiam la teksto postulas ilin. Aliaj kritikas, ĉar — laŭ ili — la »beleco« de la presita teksto »suferas«, kiam aperas supersignoj aŭ, precipe, kiam meze en linio subite aperas tia litero de malsama tipo.

En tiu koncerno, estas menciinde, ke nuntempe en Francio — por modernigi la tipografian aspekton — oni ne malofte anstataŭigas la tri literojn é/É, è/È kaj ê/Ê per la sola litero ē/É, kiu surhavas horizontalan streketon, anstataŭ la tri supersignoj france nomitaj »accent aigu«, »accent grave« kaj »accent circonflexe«. Oni efektive ne povas nei ke, dank'al tio, la tipografia aspekto de modernaj francaj presaĵoj estas pli regula (aŭ, se oni preferas: malpli malregula); tial, ĉe francaj presistoj kaj ties klientoj, tiu nova liter-tipo havas jam relative multajn adeptojn.

Simila tendenco ekmontras sin, lastatempe, ankaŭ en Esperanto--presaĵoj. Oni nun vidas aperi la novan, modernan literon ū apud la klasika ŭ; ekzemploj troveblas en »SCIENCA REVUO EN ESPERANTO« nº 69 (pĝ. 7 kaj 8) kaj nº 70 (pĝ. 56 ĝis 62): antaū, kaūzo, aū, anstataūigi, taūgi, aūskultantoj, k.a.

Ĉar, klarvideble, la literbildo de ū aspektas pli eleganta/ol tiu de ŭ, altrudas sin la demando, ĉu tiu principo ne povus esti aplikata ankaū al la kvin aliaj supersigno-havaj Eo-literoj, nome ĉ/Ĉ, ĝ/Ĝ, ĥ/H, ĵ/ĵ kaj ŝ/Ŝ. Se, anstataū cirkumflekso, ili surhavus fajnan horizontalan streketon, la aspekto de tiuj literoj estus pli »glata«, pli agrabla, malpli stranga, do ankaū malpli ŝoka por eksteruloj.

Tio speciale bone videbliĝas en vortoj, kiuj enhavas du aū tri literojn tiajn, ekzemple: ĉirkaŭaĵo ŝarĝĉaro maĉkaûĉuko kaj aliaj. Por ricevi trafan bildon, sufiĉas sinsekve tajpi tiujn vortojn, laū ambaû manieroj.

Estas memkompreneble, ke la ĵus proponita solvo povas esti praktikata nur tiam, kiam la presisto disponas pri la necesaj litertipoj kun supersigno, kaj kiam li bezonas ilin, li tre facile povas mendi ĉe la fabrikisto tiajn kun super-streketo anstataū la samaj kun cirkumflekso.



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 18. n-ro 4 (1967)

342.23 + 347.53

## KRIMINALA KAJ CIVILA KULPOJ

**(Lj. Mihajlov, Sofio, Bulgario)**

Unu el la plej diskutataj kaj disputataj problemoj en la jura literaturo estas la problemo: ĉu ekzistas du specoj de kulpo (kriminala kaj civila) aû ekzistas nur unu kulpo, sed kun du nomoj.

La problemo havas gravan praktikan signifon. Se la kulpo estas nur unu, tiam ne povas en la civila proceso esti agnoskita kiel kulpa tiu, kiu pri la sama ago estas jam en la kriminala proceso agnoskita kiel senkulpa. Kontraûe, se ekzistas kriminala kaj civila kulpoj, tiam povas en la civila proceso esti agnoskita kiel kulpa tiu, kiu pri la sama ago estas jam en la kriminala proceso agnoskita kiel senkulpa ĉar la kriminala proceso okupiĝas pri la kriminala kulpo de la juĝato, dum la civila — pri la civila kulpo.

La bulgara juĝa praktiko solvas la problemon favore al la koncepto, ke ekzistas du specoj de kulpo. Tio ĉi estas videbla el la sekvantaj du kazoj.

Laboristo eestis premita de lifto en iu entreprenejo kaj pereis. Antaŭ la akcidento ekzistis ordono, ke la lifto povas esti profitata nur por ŝarĝoj, ne por transporto de homoj, kaj pro tio la lifto estis konstruita tiel, ke ĝia movado estu komandata nur de ekstere. Post kiam la lifto estis ŝarĝata kaj la pordo fermata oni ekfunkciigadis la lifton per premo sur la butono, kiu troviĝis ekster la lifto. Sed la laboristoj ne obeadis la ordonon. Ili izoladis la pordon kaj post kiam ŝarĝadis la lifton kaj premadis la butonon saltadis en la jam ekfunkciintan lifton. Tion ili faradis por ke ne iradu laŭ la ŝtuparo ĝis la etaĝo, kie la lifto devis esti malŝarĝata. Tiel kondutis ankaŭ la pereinto kaj ĉe la supreniro en la jam ekfunkciintan lifton pereis. Komenciĝis prokurora esploro, sed estis ĉesigita. La prokuroro konkludis, ke neniu el la estraro de la entrepreno estas kulpa pri la akcidento. Sed la heredantoj de la pereinto komencis civilan proceson kontraŭ la entrepreno kaj la civila tribunalo verdiktis ĝin pagi kompenson. Laŭ la verdikto de la civila tribunalo la estraro de la entrepreno estas kulpa. Kaj la kulpo konsistas en tio, ke la estraro ne faris sufiĉan kontrolon pri tio kiel estas plenumata ĝia ordono por neuzo de la lifto por transporto de homoj. Evidente estas, ke la civila tribunalo ne konsideras la estraron kriminale kulpa. La civila tribunalo konsideras la estraron nur civile kulpa. Kaj tio signifas, ke laŭ la civila tribunalo ekzistas du specoj de kulpo. En la traktita kazo la estraro estas kriminale senkulpa, sed civile kulpa.

Alia ekzemplo. Post kiam estis finita laboro sur iu el la kampoj de iu agrikultura laborkooperativo la laboranta sur tiu ĉi kampo grupo da kooperativaninoj devis transiri sur alian kampon. Du el la kooperativaninoj supreniris en la kooperativan ĉaron, kiu en tiu ĉi momento preterveturis. Post kiam la kooperativaninoj supreniris la ĉaristo ekvipis la ĉevalojn. Ili abrupte ŝanĝis la rapidecon de sia movado kaj unu el la kooperativaninoj, kiu staris ne tre firme en la fino de la ĉaro, falis kaj pro la frapo mortis. La prokuroro ne komencis kriminalan proceson kontraŭ la ĉaristo. Laŭ la prokuraro la ĉaristo estas senkulpa. La civila tribunalo tamen decidis, ke la ĉaristo estas kulpa kaj pro lia kulpo kondamnis la agrikulturan laborkooperativon pagi al la edzo kaj al la filinoj de la pereinta kooperativanino kompenson. Evidente estas, ke ankaŭ en tiu ĉi kazo la civila tribunalo konkludis, ke ekzistas du kulpoj: kriminala, kian la ĉaristo ne havas, kaj civila, kian la ĉaristo havas kaj sekve de kio naskiĝas civila respondeco ankaŭ de la kooperativo.



La rezulto, ĝis kiu venas la bulgara juĝa praktiko, iufoje naskas la demandon: ĉu tiu ĉi praktiko ne estas paradoksa? Ĉu mortkaŭzigo povas esti sankcionata nur per civila sankcio?

La bulgara juĝa praktiko ne estas paradoksa. La juro konas eĉ kazojn, kiam la riproĉinda mortkaŭzigo entute ne estas jure sankcionata.

Ĉiu riproĉinda konkreta ago estas rezulto de senfina kaŭza ĉeno. La juro sin interesas nur pri ia parto de tiu ĉi senfina kaŭza ĉeno, kompreneble parto, realigita de homa konduto. La juro prenas nur tian parton, kiu laŭ la dominantaj en la konkreta historia momento juraj konceptoj meritas esti jure sankcionita. La parto, kiu interesas la kriminalan juron, estas limigita per kadroj de la tiel nomata plenumanta ago. La kriminala juro ne okupiĝas pri tiuj ĉeneroj de la kaŭza ĉeno, kiuj restas ekster la plenumanta ago. La civila juro tamen okupiĝas pri tiu parto de la senfina kaŭza ĉeno, kiu parto prezentas rektajn kaj senperajn malutilajn konsekvencojn de la riproĉindo el vidpunkto de la civila juro-ago, sendepende de ĝia kriminaljura pritakso. La ceteraj, ekster limoj de la plenumata ago kaj ekster la rektaj kaj senperaj mulutilaj konsekvencoj, socie riproĉindaj ĉeneroj de la senfina kaŭza ĉeno estas lasitaj, por sankcionado, nur al la socia moralo. Tiel ekzemple, kiam troviĝanta sub la gepatra kontrolo nerespondecebla infano kaŭzas morton, civila respondeco naskiĝas por ĝiaj gepatroj. En tiu ĉi okazo la gepatroj respondecas ne pro fremda, sed pro sia propra ago. Ili respondecas pro tio, ke ili ne estas donintaj al sia infano bonan edukon. Ilia konduto estas ĉenero en la kaŭza ĉeno, kondukinta ĝis la morto. Tiu ĉi ĉenero ne estas jure riproĉinda, sed civiljure riproĉinda. La pli malproksimaj ĉeneroj tamen povas ne esti eĉ civiljure riproĉindaj. Sciate estas, ke la eduko de la infano estas donata ne nur de la gepatroj. La personeco de la infano estas formata ankaŭ de sociaj faktoroj, troviĝantaj ekster la familio. Tiuj ĉi faktoroj samtiel povas esti ĉeneroj en la kaŭza ĉeno, kondukinta ĝis la morto. Tiuj ĉi riproĉindaj ĉeneroj estas tamen sankcionataj principe nur de la socia moralo.

***

La konkludo de la bulgara jura praktiko, ke ekzistas du specoj de kulpo, ne povas ne meti la demandon, multfoje diskutatan en la jura literaturo pri la esenco de la diferenco inter la kriminala kaj civila kulpoj. Se ekzistas du specoj de kulpo, inter ili devas ekzisti ia diferenco. En kio konsistas tiu ĉi diferenco? Se oni volus doni koncizan

karakterizon de kulpo, oni devus ĝin difini kiel malmobilizecon de la konscio. Ankaŭ intenca kulpo estas finfine malmobilizeco de la konscio. La socia vivo postulas mobilizecon de la konscio por ke estu plenumataj la kreitaj en la socio juraj normoj. La malmobilizeco, kondukinta ĝis rompo de la normoj, estas kulpo. Tiu ĉi malmobilizeco havas tamen vicon da ŝtupoj — de la plej malalta ĝis la plej alta. La plej altaj ŝtupoj de la malmobilizeco prezentes plej grandan danĝeron por la socio kaj pro tio pri ĉi tiuj ŝtupoj de malmobilizeco okupiĝas la kriminala juro. La malaltaj ŝtupoj estas lasitaj al la civila juro. La pritraktitaj kazoj pri la morto de la laboristo, premita de la lifto, kaj pri la morto de la falinta el la ĉaro kooperativanino estas bona ilustraĵo de tiu ĉi koncepto.



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 18. n-ro 4 (1967)

## ALVOKO POR EKONOMIISTOJ

### Letero de leganto al la ĉefredaktoro

Estimata Prof. Popoviĉ,

En Scienca Revuo mi legis multajn interesajn artikolojn. Mi ankaŭ vidis multajn artikolojn kiujn mi tute ne povis kompreni. Malgraŭ tio, mi estas kontenta kun la revuo — fake miksita revuo ne povas ja doni ĉion kompreneblan por ĉiu. Nur du aferoj ne plaĉas al mi.

La unua, malpli grava, koncernas la **tipografian aspekton de la revuo.** Kompare kun la komenco de la eldonado en Jugoslavio, la aspekto estas multe pli bela, la preseraroj ne tro oftaj. Sed ĉu vere oni ne povas ankoraŭ plibeligi ĝin?

La dua koncernas **ekonomiajn artikolojn.** Ili tute mankas en la Scienca Revuo. Kaj hodiaŭ ĉiuj homoj interesiĝas pri ekonomiaj problemoj, ĉar la tuta mondo »bolas« ĝuste en kunligo kun la monda ekonomio. La rilatoj inter ekonomie pli fortaj kaj malpli fortaj landoj, evoluitaj, malpli evoluitaj kaj evoluantaj landoj, problemoj de internacia mono kaj de la kreditbankoj, ekonomia helpo kaj misuzo de ekonomiaj malfacilaĵoj ktp. Jen la tempo **pri** kiuj mi ŝatus legi en la Scienca Revuo — ne nur mi sed granda plimulto de abonantoj (mi kredas).

Jen nun tre aktuala temo pri intervaloro de diversaj valutoj, kiu fariĝis treege interesa post la devalorigo de pundo. Kio estas la veraj kaŭzoj por perdo de valoro de unuopaj valutoj? Kiel oni povas atingi ke iu valuto havas konstantan valoron? Kaj ĉu ni ne troviĝas **antaŭ nova ekonomia krizego** (kiu povus ekesti se dolaro ekmarŝos la vojon de pundo)? Multaj kredas ke pundo devis devaloriĝi ĉar ĝi ne estis sufiĉe »kovrita« (almenaŭ ne ĝia parto servanta kiel internacia mono). Sed tio estas ankoraŭ pli grava pri la dolaro, ĉar oni uzas ĝin internacie pli multe ol en Usono mem (kaj en la lando mem ĝia valoro estas tre dubinda!).